

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Maj 1946

34 årg. Nr 5

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## SEF:s jubileumskongress i Uddevalla.



Under pingsthelgen 8—10 juni håller SEF sin årskongress i Uddevalla å Föreningen Nordens semesterhotell Bohusgården vid den natursköna Byfjorden. Anmälningssblankett medföljer detta nummer. Post adresseras till SEF. Esperantokongress, Box 900, Uddevalla. Postgironummer för kongressavgift och övriga avgifter är 29 78 85.

### PROGRAM.

#### Pingstafton 8 juni.

Kongressens högtidliga öppnande. Förhandlingar. Festsupé.

Uddevalla Turistbyrå ordnar med mottagning av kongressdeltagarna vid stationen. Ankomsttider uppgivas på anmälningssblanketten. Logianvisningar lämnas.

Kl. 15.00 Kongressbyrån öppnas å Bohusgården. Kongresshandlingar utlämnas.

Kl. 18.00 SEF:s styrelse sammanträder.

Kl. 19.00 Kongressen öppnas enligt särskilt program. Kongressförhandlingar.

Kl. 20.30 Interkonatiga vespero kun supeo, kanto, interbabilo, danco ktp.

#### Pingstdagen 9 juni.

Kl. 8.30 Frukost.

Kl. 9.00 Förlagsföreningen Esperantos årsmöte.

Kl. 10.00 SEF:s årsmöte fortsätter.

Kl. 13.00 Lunch.

Kl. 14.00 SEF:s årsmöte fortsätter och avslutas.

Kl. 19.00 Middag och kaffe. Underhållningsprogr.

#### Annandag pingst 10 juni.

Kl. 9.00 Frukost.

Kl. 10.00 Svenska Lärares Esperanto-Förbunds årsmöte. Alla för undervisning intresserade är välkomna.

Under kongressen komma olika arrangemang att ordnas. Eventuellt en båttur på Byfjorden, utflykt till den anrika badorten Gustafsberg eller till de unika och världsberömda snäckskalsbankarna. Bli det solsken och gott väder, så finns det fina badmöjligheter vid det kommunala badet, som ligger strax nedom Bohusgården.

*Vår bild visar Kungstorget och Kyrktornet i Uddevalla.*

**JURSLA-KURSERNA** se nr 4 sid. 37 14—28 juli 1946.

#### HEROLDO VENIS

Kiel printempa signalo venis la unua numero de la reviviginta Heroldo de Esperanto, nia sendependa internacia organo. Ni kore salutas tiun kunbatalanton kaj atentigas niajn legantojn pri la anonco, page 46.

**HAR NI BESTAMT ER FÖR ATT DELTA I SOMMARUNIVERSITETET I UDDEVALLA?**

**SE PROGRAMMET I FÖREGÅENDE TIDNING!**

## Vi jublera i Uddevalla.

En kongress är ett minne, som man lever länge på, gläds åt och värms av. Därför bör ingen underlåta att bli med i år, då vi firar förbundets 40-årsjubileum i den goda staden Uddevalla. En härlig trakt vid havet — en samvaro med samideanoj under glada och trevliga former. Vad kan man mer begära?

Programmet är inte i detalj fastställt än, men så mycket är i alla fall säkert, att inte ångrar någon, att han styr sina färde till västkustens pärla vid den härliga Byfjorden under inspirationens högtid. Det blir högtidliga avsnitt och allvarets diskussioner, ty det är framtiden vi ska dryfta, men det blir också klackarna i taket och roliga övningar för skrattnusklerna och bengymnastik, vare sig det nu blir fråga om att låta benen gå i den moderna rytmen till tonerna av en hotmelodi eller det handlar om att bestiga någon av stadens sju kullar för att låta blicken fara över ett bedårande sceneri av skog, hav, himmel och klippor.

Utflykter kan det bli, om vi bara får in anmälningarna i tid, så vi vet, vad vi har att planera för. Vi har mycket att bjuda på: Skeppsviken, ett förstklassigt och modernt friluftsbad, som blir en fara för kongressförhandlingarna, om sommarsolen gassar, och det rör sig om den, som inte är tillräckligt stark i den esperantistiska anden. Vi har gamla Gustafsberg, som har namn av tjusarkungen och vilar på minnen från rokokons glada dar. Restaurang, badplatser, härliga skogsstigar, utsiktspunkter. Har nån glömt, hur det känns att åka droska, så är Uddevalla den enda stad i Svedujo, som ännu håller kvar två exemplar av detta forntida fortskaffningsmedel med suflett, granna hästar med svartpolerade hovar och August Blanchska kuskar. Vi kan också göra en avstickare till de världsberömda bergen av snäckskal, som finns vid Bräcke.

Deltagare räknar vi med från hela landet, men även utlandet blir representerat. I dagarna har jag fått bekräftelse på, att vi kommer att få höra en framstående esperantist och pianist Roland Dupuis från Rouen. Och det blir flera.

Logi ordnas dels på Bohusgården, där gästerna placeras som i en första klass sovvnagn i över- och under-slaf, dels på Gustafsberg, som ligger en kvarts väg från kongresejo, dels på stadens hotell och dels privat. Uddevalla Turistbyrå har hand om dessa arrangemang, och vi har gjort så, att vi tar ett billigt gemensamhetspris eller 4 kr. per natt. Kongressdeltagarna måste binda sig för logi under 2 nätter, ty det är gott om turister i stan i pingstens tid, och bostadsbristen är ett faktum även i Uddevalla.

Maten är halva födan, heter det, och fördenskull är det väl sörjt för, att vi ska kunna smörja kråset med god och hederlig husmanskost. Fara för viktökning föreligger.

Havet var redan i antiken det stora och underbara. Nutiden uppskattar inte den salta böljan mindre, och Uddevallas läge vid innersta ändan av en fjord gör, att staden kan bjuda både på blankslipade hållar, gräsbackar, skog och sand. Man kan få hyra en roddbåt, om man vill, och ta sig en tur.

Mi finigas la reklaman parton de la kongresa komitato kaj diras elkoran: Bonvenon al Uddevalla.

EDE.

### MED DAGENS NUMMER

följer som bilaga anmälningsblanketten till

### JUBILEUMSKONGRESSEN I UDDEVALLA 1946.

Vi ber alla, som tänker sig till västkusten under pingsthelgen att så snart som möjligt dels insända sin anmälan under adress SEF. Esperantokongress, Box 900, Uddevalla, dels insända kongress- och andra avgifter före den 20 maj, så att det blir möjligt att ordna allt på bästa sätt i god tid. Kongressens postgironummer är 29 78 85. För dem, som ej blir i tillfälle att komma med på jubileet i Uddevalla, finns det en möjlighet att få kongressdokumenten sig tillsända genom att sätta in 2:50 på vårt postgirokonto. Den avgiften bereder inte bara beställaren glädje utan blir till hjälp för förbundet.

## Motioner till kongressen.

### MOTION 1

Förbundsstyrelsen föreslår, att förbundet beslutar organisera en särskild ungdomsorganisation, avseende ungdom under 18 år liksom även äldre ungdomar, som äro elever vid läroverk, gymnasier och seminarier. Dessa medlemmar erläggas en årsavgift av 3 kr., för vilken summa erhålles såväl medlemskap i förbundet som abonnemang av Svenska Esperanto-Tidningen. Förbundet hemställer, att årsavgifterna inkasseras av resp. lokalföreningar, i de fall då sådana finnas på orten, samt att inga övriga avgifter måtte påläggas nämnda ungdomsgrupper för deras medlemskap i lokalföreningen. På orter, där särskilda ungdomsföreningar organiserats, äga dessa att själva besluta om sin ekonomi.

### MOTION 2

Då det är av vikt att Svenska Esperanto-Förbundet stödjer bildandet av sektioner för olika fack, föreslår förbundsstyrelsen, att årsmötet måtte besluta,

att förbundet uttalar sig för upprättandet av sektioner för olika fack och yrken samt

att varje sådan sektion vid sammanträde på SEF:s årsmöte utser en sektionsstyrelse, vars ordförande automatiskt har säte och stämma i SEF:s förbundsstyrelse.

### MOTION 3

Undertecknad föreslår att förbundet vid anordnande av kongresser någon gång gör en överenskommelse med alla svenska esperantoorganisationer att hålla sina kongresser på samma plats antingen samtidigt eller omedelbart efter varandra, så att en annan organisation som vill vända sig till alla esperantister då också kan ordna en kongress och ordna önskvärt samarbete. Esperanto är ju skapat att användas av alla.

Speciellt skulle det vara nyttigt, om de internationella esperantoorganisationerna så ordnade sina kongresser. Då skulle de också kunna inbjuda andra organisationer, som hade starkt intresse för esperanto, dit, och många esperantister kunde deltaga i denna organisations kongress och esperanto därigenom automatiskt införas i kongressen och organisationen.

Hänvisas till Förslag från undertecknad till Sv. Freds- och Skiljedomsföreningen, vilket sedan skall sändas Eder.

Töreboda 31 mars 1946.

Fritz Lindön.

### MOTION 4

Paca kaj Esperanta aferoj estas proksime parencaj. La bezono de neŭtrala lingvo en landoj, kie estas parolataj diversaj lingvoj kaj kie do la koncernaj gentoj venas en konfliktojn unu kun la aliaj, estis ja la origina motivo por la kreiĝo de esperanto.

La esperantistoj tamen ĝis nun ne tre multnombre aliĝis al la Zamenhofa opinio en la paca demando por ne tuŝi la neŭtralecon de la movado, aŭ pli ĝustadire por ne subteni opinion, kiun gvidantaj politikistoj pro nekompreneo aŭ pro ŝtategoistaj motivoj kontraŭstaris. Konforme al tiu sia teniĝo la sveda esperantomovado, forlasante la absolutan neŭtralecon, limigis sin al kredo pri kaj agado por paco fondota sur la tradicia potencpolitiko kaj tiuj organoj, kiujn internaciaj politikistoj povos krei sur tiu fundamento. Tion oni faras ignorante la fakton, ke la potencpolitiko kun ĝia strategia diplomatio kaj ĝia ŝakrado kun popoloj kaj teritorioj estas plej danĝera malamiko al la paco. Kontraŭe, estas necese krei kiom eble plej proksiman komunikigon kaj komunecon inter la vastaj popolamasoj mem trans la limojn por reciproka informado pri kaj defendado kontraŭ la potencpolitikistoj, por ke tiel iom post iom ankaŭ la nove fondita ŝtatligo, Unuigitaj Nacioj, transformiĝu en veran tuthomaran komunecon.

Ankaŭ tamen multaj esperantistoj subtenas la Zamenhofan opinion pri justeco (vidu lian respondon al Hebrea Ligo), komuneco kaj senpartia fundamento por la internaciaj kunlaboro kaj interkompreneo, kiel la veraj fundamentoj por daŭra paco.

Konforme al tio ni do proponas:



1) Ke la federacio aliĝu al paca movado sur fundamento de Homaranismo,

2) Ke ĝi ankaŭ agadu por ke aliaj organizoj esperantaj faru saman decidon,

3) Ke post kiam diversaj esperantoorganizoj pri-traktis la aferon, ĝi kunvoku kune kun tiuj kaj Ligo por Homaranismo konferencon por pli firme organizi la movadon, por plivastigi la internaciecon de l'movado kaj por komune sin turni al la pacorganizoj diversaj,

4) Poste partopreni kunvokadon de internacia konferenco, eble samtempe kun iu internacia esperanto-kongreso, por akcepti definitivan programon.

Por Internacia Ligo por Homaranismo.

Fritz Lindén  
sekr.

## SEF Kolono

**Kongressombud** uppmanas insända fullmakt att representera sin förening i god tid före årsmötet (till SEF, Tegelbacken, Stockholm).

**Diplom** utdelas vid årsmötet till de föreningars representanter, som ansökt härom för sådana medlemmar som varit medlemmar av SEF minst 10 eller 25 år. Ansökan skall skrivas på blankett SEF 11 och insändas i god tid före årsmötet.

**Nästa kongress** kommer att hållas i Gävle 1947, varifrån SEF med tacksamhet för någon tid sedan emottagit inbjudan.

**FN-deklarationerna** har nu börjat strömma in allt livligare, men ännu tycks en hel del av våra föreningar "glömt bort" tidigare gjorda påpekanden, att det är "nu eller aldrig" den hittills största insatsen till esperantos fromma skall göras. 50.000 blanketter är nu till största delen utsända i vårt land, men då det troligen inte finns någon möjlighet att få in dessa till den 1 maj, måste vi ge en sista frist. Nu gäller det alltså att samtliga 50.000 deklarationer skall vara återsända i underskrivet skick till SEF allra senast

den 1 juni 1946.

Samtidigt kunna vi meddela, att vi låtit trycka 120.000 blanketter för vår broderorganisation i Holland och 100.000 för Frankrike, vilka själva ej kunnat ordna detta på grund av pappersbristen i dessa länder.

Alltså: Gör en sista kraftansträngning. Rekvirera blanketter och sätt flera av medlemmarna i arbete. Även de av våra prenumeranter som ej äro medlemmar äro välkomna att hjälpa till med namninsamlingen. **NUN AU NENIAM!**

### AMIKARO DE ESPERANTO

20 stycken av våra medlemmar har hörsammat vårt upprop i Komuniko 3 och rekvirerat block med medlemskort för Amikaro De Esperanto. Men om vi skall kunna komma i tillfälle att dela ut de utlovade 2 st. stipendierna bland denna medlemskategori måste alla de fyrahundra block som iordningställt ut bland våra medlemmar. Och då dessa stipendier äro så lockande som 250:— kr. för resa till nästa världskongress bör det vara ganska lätt att värva massor av medlemmar i denna vår stödorganisation. Avgiften är endast 2:—, vilket även innefattar ett speciellt medlemsblad, som utkommer i höst. Komihåg, att även för denna kampanj gäller årets valspråk **NUN AU NENIAM**. 1946 är SEF:s jubileumsår och bör bli rekordår.

### KORESPONDADO

Koresponda Centro peras viajn leterojn (afrankitaj kaj sen adreso) al konvenaj samideanoj en ekzemple: Anglio, Argentino, Belgio, Brazilio (ni ĵus ricevis adresliston kun 50 nomoj el Rio de Janeiro), Ĉeĥoslovakio (100 nomoj), Bulgario (30), Egiptio, Francio, Hispanio, Irlando, Italio, Maroko, Nederlando, Portugalio, Sudafriko, Svislando, Usono, ktp.

Ne forgesu ĉiam skribi vian nomon kaj adreson tre legeble. B. v. noti ke ni ne povas sendi al vi adresojn. **Sam.**

## Internationell ungdomskonferens.

Esperanto för ungdomen! Ater riktas en vädjan till svenska lärare och ungdomsledare att icke låta vår appell klinga ohörd.

Sätt Er i förbindelse med Tutmonda Junular-Organizo, Svenska Sektionen. Under augusti månad i år hålles den internationella ungdomskonferensen i Blankenberge, Belgien.

Detta är riktat till Dig, som ännu inte aktivt deltagit i ungdomsarbetet: Gör vad Du kan, många arbetsuppgifter vänta.

För övrigt förbered redan nu Ditt semesterfirande i Belgien och begär upplysningar om rese-möjligheter m. m. hos T. J. O., Svenska Sektionen, Adress: Karl Erik Karlsson, Upplandsgatan 69 1 tr., Stockholm.

### DELTAĞ I SOMMARUNIVERSITETET I UDDEVALLA!

### DELTAĞ I JURSLA-KURSEN!

### SOMERKURSOJ EN TAIPALSAARI

Someraj Esperantokursoj en Finnlando okazos ree en tre bela loko en la Libertempejo sur la suda bordo de la belega Saimaa-lago 30.6—10.7 1946. Ĉifoje oni havas nenian amasloĝadon ĉar la kursejo konsistas el malgrandaj dometoj. Ankaŭ ekzistas ebleco starigi propran tendon sur la sekaj, belaj pindeklivoj. La programo ne estas ankoraŭ tute fiksita, sed certe ĝi estos almenaŭ egale amuza kaj fruktodona kiel lastjare. La kotizo enhavanta ĉiujn kostojn en la kursejo estas por skandinavo 60 kronoj. Tiu sumo estas pagota al Förlagsföreningen Esperanto en Stockholm aŭ Dansk Esperanto Forlag en Aabyhøj al mia konto. Se oni volas havi finnan valuton por sia libera uzo, oni pagu respondan kvanton da kronoj al la menciita konto laŭ oficiala kurzo kaj mi ĉi tie donas la deziratan sumon. Vi povas aĉeti bileton rekte al la proksima urbo Lappeenranta aŭ nur al Turku, de kie mi havigos bileton ĝis la kursejo. Do ekzistas neniam malfacilaĵoj je valuto.

Ni atendas multajn skandinavojn al Taipalsaari. Bonvenon!

Joel Vilkkı, Somero (Finnlando)

**Esperantojubileo en Grums.** La esperantoasocio en Grums la 24-an de marto festis sian 15-jaran jubileon. Invititaj ĉiuj esperantokluboj en Värmland—Dal kaj krome reprezentantoj por ĉiuj organizoj en Grums. Prezidanto komercisto Tage Karlsson bonvensalutis la 50-on de esperantistoj el Karlstad, Arvika, Kristinehamn, Amål kaj aliaj lokoj, kaj la ceterajn, kiuj alvenis. Salutoj alvenis el multaj lokoj en okcidenta Eŭropo. Komercisto Georg Nordling tradukis kelkajn el la salutoj. Gunnar Elg parolis pri la historio de la klubo. Konata militfuginto s-ro Bepperling rakontis pri siaj aventuroj antaŭ kaj post sia forveturo el Germanujo kaj dum sia tempo kiel instruisto por holandaj infanoj.

**Samideanoj!** Ĉar det någon av Er, som äger några gamla sportsaker (bollar, sportkläder, -strumpor eller -skor) som Ni vill ge bort eller sälja till lågt pris åt våra tjeckiska kamrater? Var god vänd Eder till Ebbe Vilborg, Älvsborgsgatan 50, Göteborg.

**La Donacpakajoj al Hungarlando** la 26an de aprilo pasis la dan-germanan limon laŭ sciigoj al s-ino Alamo kaj certe nun estas en Budapeŝto.

La kolektado daŭrigas. La adreso por pakajoj estas S-ino Karin Hägglund, Pontonjägatan 35, Stockholm K, kaj por mono Esperantoförbundet, pg 2012, Stockholm.



## Brila jubilea festo en Malmö.

### Multaj partoprenantoj.

La paskan lundon. Super la enirejo de la urbodomo en Malmö treege granda esperantoflago. Alia flago ekster la restoracio Palladium ĉe la ĉefstrato. La pramo alvenas tagmeze, kaj 55 danaj gesamideanoj salutas la svedajn amikojn. Dum 6 jaroj multaj ne vidis unu la alian. Lange, Noll, Vasiljef, Kühlmann, Møller, Holger Hansen, Windeballe kaj multaj, multaj aliaj. Josef Vittek, Ĉeĥoslovakujo, Elisabeth Schlanger, Hungarujo, parolas kun Elmar Kalmus, Estonio, sur la bordo. Kio okazas? Klubo Esperantista de Malmö festas sian 40-jaran jubileon.

Ĉiuj gastoj unue havis eblecojn lunci en la studhejmo de la klubo, kaj ĝi fakte fariĝis plenplena. Sed baldaŭ estis tempo por la festo en la pompa salono de la urbodomo.

Post la himno la kluba orkestro plenumis sian parton de la programo. En sia salutparolado la prezidanto, s-ro Jan Strönne, esprimis sian grandan ĝojon, ke oni denove povas libere spiri kaj ke Öresund ne plu estas barilo inter danoj kaj svedoj. Wilhelm Johansson, Malmö, verkis jubilean prologon, kiu altiris grandan atenton.

Ĝuinda estis la kantoj de f-ino Lucia Lundborg, Malmö, kiu al ni prezentis "La unuan fojon mi vidis vin" kaj "La dimanĉo de l'paŝtistino" (Ole Bull), kaj poste estis tempo por la festparolado de s-ro Leonid Vasiljef, Kopenhago. En ege bona kaj tre humile prezentita parolado li memorigis nin pri niaj esperantistaj devoj kaj esprimis sian fortan deziron, ke ni ĉiuj vivu en paco kiel bonaj fratoj.

"La tagiĝo", komune kantita, estis kvazaŭ enkonduko al multaj salutoj de diversaj ĉeestantoj. Rerezentantoj de diversaj nacioj, klubaj prezidantoj kaj individuaj membroj alportis salutojn al la jubileanto. Nia "frato", Konversacia Esperantista Klubo, Kopenhago, donacis al la klubo belegan, prezidantan sonorigilon el arĝento. Kaj nun ni povas signali eĉ al Kopenhago. S-ro Vasiljef ricevis la taskon disdoni belegajn diplomojn, desegnitajn de f-ino Hildur Wallin, Malmö, al kvin membroj, kiuj dum minimume 10 sinsekvaj jaroj estis estraranoj: Gösta Henriksson, Ester Andrén, Helge Andrén, Jan Strönne kaj Wilh. Johansson. En la kadro de la diversaj salutoj la kluba sekr., Ester Andrén, laŭtlegis telegramojn, kartojn kaj leterojn, kiuj alvenis el diversaj lokoj.

Kiam fine la orkestro ludis la marŝon "Vivu Esperanto!" la aplaŭdoj tiel ege tondris, ke ĝi ankoraŭ unu foje devis prezenti la saman marŝon.

La festa tagmanĝo sekvis. Plenplena restoracia salono. Flagoj, tablokantoj kaj bonega humoro. La kluba prezidanto transdonis florojn al gesinjoroj C. B. Lundborg, kiuj partoprenis la unuan kunsidon 1906 kaj ankoraŭ estas aktivaj. Krome la prezidanto sciigis, ke la mortinta profesoro Otto Simon el Aŭstrio testamentis

## PRINTEMPA BALO

de F. Szilágyi.

Al idoj zumas en la muska nesto  
fabelon vent, ĉi gnomo el la mont,  
libel baletas en odora festo,  
babile ondas junpetola font.

Kaj varmas. (Nia trajno nur atendas.)  
Printempjubilo. (Nin preteros trajn.)  
Mildigu! Revon la printempo sendas,  
junigan spiron. Spitus kiu ajn?

Narkoton floran spiras, kapoturnan  
l'arbaro juna: nun forgesu vi!  
Bruligus flamen eĉ la cindron urnan  
Printemp-fraŭlin, ĉi dolĉa anarki.

Jen trajno pretermuĝas, devo senindulta,  
forblovis ĉion sorĉan al la ŝajn,  
senpensan gajon kruda polvo fulga.  
Oscedas nia trudvekita trajn.

"Ho estus saĝe: paki, bremsi, salti!"  
"Nur ŝvitu plu ni en sovaĝa svarm,  
se venos nokto, ni ja povos halti."  
La trajno siblas, nin velkigas varm.

## Estrarkunsido de IEL en Londono.

Dum la pasko kunsidis la estraro de IEL, kiu dum 7 jaroj ne havis eblecon kolektiĝi. La sekretario s-ro Goldsmith raportis, ke IEL bone eltenis la militjarojn. Eĉ la ŝuldoj de la ligo, kaŭzitaj dum la starigo, estas nun grandparte pagitaj. Momente IEL havas pli da membroj ol ĝi iam havis, kio fakte estas mirinda. La jarlibro de IEL, kiun oni ĝuste nun distribuas, ankaŭ montras delegitan reton, kiu ĉirkaŭprenas la tutan mondon. Novaj landaj asocioj jam petis aliĝon al IEL.

La estraro decidis okazigi la universalan kongreson 1947 en Svisujon, kaj la kongreson 1948 en Svedujon (Malmö). La kongreso 1949 laŭplane estos aranĝata de la francoj.

La estraro ankaŭ diskutis tre detale la organizaĵajn problemojn de la internacia esperanto-movado kaj prezentos pozitivan proponon por ĝia solviĝo.

Dum la kunsidoj la estraro kompreneble pritraktis diversajn aliajn problemojn pri nia ligo. Generale oni povas diri, ke la kunestado estis stampita per plej forta optimismo pri la estonteco de la Esperanto-movado, kiu ĝuste nun tre rapide ŝajnas evoluigi.

E. Malmgren.

## DELTAG I SOMMARUNIVERSITETET I UDDEVALLA!

### NORDENS ESPERANTISTER SAMLAS I UDDEVALLA I PINGST PA SOMMAR-UNIVERSITETET!

sian tutan bibliotekon, kiun li povis savi, al la klubo, kaj ke la honora prezidanto de SEF Paul Nylén sendis grandan jubilean donacon, kiu konsistas el tre valoraj gazetoj kaj libroj el la unuaj tempoj de la esperanto-historio.

Fine agraba kunestado. Danco. Babilado ktp.

Kaj pro valutaj malfacilaĵoj kaj pro manko de hotelĉambroj la gesamideanoj en Malmö faris sian plejblon por gastigi la gastojn dum la nokto. Des pli intima kaj amika fariĝis la kunestado. La klubmastrino Clary Hansson certe faris grandan laboron.

Entute belega memoro por la tuta vivo.

P-into.



## Esperanto en Radio.

**Kortrijk, Belgujo:** ĉiuvendrede de la 21 h. 30 ĝis la 22 h. 45 (202,3 m.) Esperanto-kroniko.

**Lille, Francujo:** ĉiudimanche de la 9 h. 15 ĝis la 9 h. 30 (248 m.).

**Moravska-Ostrava, Ĉeĥoslovakujo:** ĉiumarde je la 22 h. 20 (325,4 m.) Esperanto-horeto.

**Praha 1, Ĉeĥoslovakujo:** ĉiulunde kaj ĉiujaŭde de la 22 h. 20 ĝis la 22 h. 30 (269,5 kaj 1571 m.) Informoj. **Adreso:** Radio, Stalin-str. 12, Praha XII.

**Sofio, Bulgarujo:** ĉiumerkrede je la 17 h. 15 (352 m.).

**Varsovio, Polujo:** ĉiulunde de la 22 h. ĝis la 22 h. 15, Informoj. **Adreso:** Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio.

**Radio.** Sveda Radio dissendos programon en Esperanto jaŭde la 16 majo je 15.10—15.30 Grenviĉa tempo (=16.10—16.30 mezeŭropa tempo) per mallonga ondo 19,80 m. La sama programo estos ripetata por ekstereŭropaj landoj vendrede la 17 majo je 1.10—1.30 Grenviĉa tempo per mallongaj ondoj 31.46 kaj 49.46 m. En venontaj monatoj la Esperanto-dissendoj okazos je la samaj horoj la 14 (15) junio kaj la 16 (17) julio. Bonvolu sendi informojn pri la aŭskulteblecoj kaj eventualaj programproponoj al Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm, al kiu estas komisiita de la Sveda Radio aranĝi la Esperanto-programojn.

**Radiostacio Praha I, Esperanto-sekcio, Prag, Ĉeĥoslovakio,** publikigas en elsendo la jenon: Kiu skribos al la stacio ricevos presitan informilon pri la esp-movado de diversaj landoj.

**Brasilien. Belle Horisonte Mineas Gerais** Lördagar 17.00—17.30 (Brasil. tid omkr. 5 tim. efter svensk tid). Våglängd kortvåg 49.00 meter. Turistpropagando kaj informoj pri Brazilio.

**La Jarkunveno de "Centra Dana Esperantista Ligo".**

Dum la Pentekosto multaj danaj Esperantistoj renkontiĝos en Holbæk por labori kaj por ĝui kamaradan kuneston. La unuan tagon de Pentekosto je la 11a horo s-ro urbestro ALFRED HANSEN solene malfermos la jarkunvenon en la kongresejo, HOTEL ISEFJORD. Poste okazos ĝeneralkunveno kaj vespere komuna manĝado kaj festo. La ĉuan tagon oni ŝipe ekskursos al la idilia insuleto ORØ.

Ankaŭ svedaj gesamideanoj estos kore bonvenantaj, kaj salutoj el aliaj landoj estos dankeme akceptataj.

**Holger Hansen, prez. de la komitato,**  
Ringstedvej 17, HOLBÆK, Danlando.....

**Malgranda Revuo** havas en Svedujo 31 abonantojn, 75 ekz. vendataj komisie kaj al okazaj aĉetantoj. Ĉu ne troviĝas pli da svedaj esperantistoj, kiuj volas subteni provon krei kulturan esp. revuon? — MR aperas kvaronjare. Nro 1/46 aperis, nro 2 en preparo. Jara-bono 4 kr, 1 ekz. 1 kr, minimume 10 ekz. po 0,80 kr. S. Engholm, Skolg. 9, Ludvika. Poŝtĉekakonto 26 80 23.

**Harald Grønberg,** nia dana samideano, kiu lastjare reprezentis la danajn esperantistojn en nia jarkongreso kaj kiu pli frue organizis tre popularajn somerajn esp-kursojn en nia lando, estas nomita rektoro de nova, moderna lernejo (Husmandsskolen) en Odense.

Je intervjuo en Fyns Venstreblad s-ro Grønberg faris eldiron pri la nova lernejo, el kiu li volas krei "terkulturan lernejon kaj popolan alternejon sub unu tegmento", tute laŭ la soci-ekonomia programo de la etbienuloj kiel ankaŭ laŭ la lernejo-ideo de Grundtvig.

## LITERATURO.

**E. Dahl: LÄROBOK I ESPERANTO FÖR SKOLAN.**  
(Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 184 p.)

Fine ekzistas lernolibro por svedaj infanoj! La aŭtoro estas sperta pedagogo, multkolora individuo, kiu klopodis tiom el sia kapablo enmeti en sian lernolibron, kiom la amplekso de ne grandformata libro permesis. La rezulto estas bona helpilo por instruistoj kaj instruantoj kaj agrabla libro por la infanoj. La baza penso de Dahl estas, ke la simpla kaj logika gramatiko de Esperanto estas alloga studo por inteligenta pedagogo, ĉar ĝi akcelas la scion de la lernantoj por la sveda lingvo kaj por aliaj lingvistudoj. Tio estas la penso el ekstera vidpunkto, interne kiel ĉiu bona esperantisto, ankaŭ li propagandas por Esperanto mem. Sed la menciita vidpunkto karakterizas la sistemon de la lernolibro, kies ekzemploj, reguloj kaj taskoj estas simplaj, facilaj kaj samtempe interesaj. La konstruo — ĝuste pro la konsidero de la supra vidpunkto — estas gramatika, kio konvenas al la kutima instru-maniero en la lernejoj, kolorigita per dialogoj, legaĵoj, kantotekstoj kaj aliaj rimaĵoj, kiel la jena:

Tagojn havas la jaro.  
Akvon havas la maro.  
Varma estas la suno.  
Blanka estas la luno.  
Ronda estas la bero.  
Granda estas la tero.  
Largaj estas la stratoj.  
Belaj estas la katoj.  
Bona estas la lernanto.  
Simpla estas esperanto.

Entute oni bone komprenas la penson de la aŭtoro. Ĉio estas klarigita inter la kadroj de la libro, kaj krom tio troviĝas ekzemploj por la plivigligo de la instruado, kiun ĉiu instruisto mem povas — laŭ la direktantaj pensoj de Dahl — elkonstrui. Subskribinto pledas por la instruado per bildoj kaj li vidus volonte multe el ili en la libro. Sed nun estas nur escepta uzo de bildoj, kies kaŭzo estas supozeble la baro de la amplekso. La sistema konstruo de la libro estas ĝenerale tre bona, sed ekz. estas pli nature instrui unue la akuza-tivon de la personaj pronomoj kaj poste la akuza-tivobjekton, ol inverse kaj supozeble en la novaj eldonoj la aŭtoro donas tiun plifaciligon al la lernantoj. Tiuj rimarketoj tute ne povas tuŝi nian ĝeneralan opinion, ke la Esperanto-propagando ricevis efikan apogon en tiu ĉi klara, bone pripensita kaj valora lernolibro.

F. S.

**Usono.** La bela gazeto American Esperantist sendis martan-aprilan numeron, duone anglan, duone esperantan, kiu en gvidartikolo pritraktas la proponon de s-ro Roosevelt pri deviga instruado de internacia lingvo. Oni esperas, ke tiu propono rezultos en nova debato inter la potenculoj kaj ke tio finiĝos per decido simila al la Geneva rekomendo en 1922, t. e. gradon post grado enkonduki la lernadon de esperanto en la ŝtataj lernejoj. Oni anoncas, ke la kanadano s-ro Robert Karlson nun estas la prezidanto de EANA (Esperanto Association of North America, 114 W. 16 St. New York 11, N. Y.). La esperantan centron de Kanada nun gvidas Fraŭlino Doris Saville, Vancouver.

La nova usona militŝipo "Franklin Delano Roosevelt", la dua plej granda ŝipo en la mondo havas sur si ankaŭ esperantiston, s-ro Bill Harmon, kiu faras eskursion surŝipe.

**Belgio.** La XI:a kongreso de Flandra Ligo Esperantista okazos en Brugge dum la pentekosto 1946. "Paco kaj Justeco", la loka sekcio de la Ligo, prenis sur sin la gastigajn taskojn.

Bela ilustrita broŝuro en esperanto pri la urbo Brugge estas havebla senpage de la urba administracio. Skribu al Oficiala Servo por Turismo, Hakke-Markt, Brugge, Belgien.

## Sercado de parencoj.

Sedan esperantisterna i Buenos Aires i några fall, där andra misslyckats, haft glädjen att med bästa resultat biträda européer, som sökt kontakt med släktingar i Sydamerika, har det argentinska esperantoförbundet upprättat en särskild sektion, "Sercado de parencoj", som fått till uppgift att förmedla förbindelser mellan européer och deras vänner eller släktingar i Sydamerika, när dessa förlorat varandras adresser.

För ändamålet använder sig det argentinska förbundet av motsvarande förbund i Europa. Så t. ex. har en svensk att skriva till Svenska Esperantoförbundet, Tegelbacken, Stockholm C, varifrån förfrågningen — översatt till esperanto — kostnadsfritt expedieras till Argentina. I brevet till Tegelbacken har man (utom annat av vikt) att meddela

1) om den eftersökte: efternamn och förnamn; födelseort och födelsedag; yrke; året, då avresa från Sverige skedde, samt om möjligt namnet på avresebåten.

2) om den sökande: namn och adress; släktskapet med den eftersökte; senaste meddelande från den eftersökte.

**Uruguay.** La Urugvaja Esperanto-Societo har ordnat kurser på nytt efter kriget och återupptagit sin press-tjänst, varigenom alla nyheter från esperantovärlden bekantgöres för den uruguayanska pressen. Propagandaveckan före kurserna fick man radions hjälp, dels med en särskild esperanto-afton, dels med esperantosång i grammofontimmen. Det var de två av vår landsman operasångaren Gösta Kjellertz insjungna "La Espero" och "Tagiĝo", som återkommo varje dag under propagandaveckan.

**Esperanto-lektoratet** vid Tekniska Högskolan i Wien har återupprättats, i det att universitetsprofessor doktor Sick åtagit sig lektoratet, som grundlades 1917, och uppdragit åt Esperanto Centro, Neutorgasse 9, Wien, att inbjuda alla teknologer och i övrigt alla med minst realexamen att anmäla sig för att utan särskild kostnad använda sig av lektoratets undervisning i esperanto.

**Frankrike.** Den franska esperanto-tidningen "Kompreni" berättar, att stadsfullmäktige i Lyon uppdragit åt en esperantoförening att ordna en kurs i esperanto för de barn av olika nationaliteter och raser, som förlorat sina föräldrar i kriget och nu äro omhändertagna i barnhemmet "Adolphe Favre" i Lyon.

**Sverige-Marocko.** Senaste numret av La Verda Flamo, som bekant organ för marockanska Esperanto Förbundet, är prytt med ny titelvignett, som enligt notis i tidningen tecknats av en svensk konstnär, K. Lindström, Agnesberg.

**Čeĥoslovakio.** Nova politikfaka gazeto "Aŭroro" venis el Vizovic, Čeĥoslovakio. Ĝi anoncas sin kiel organo de Socialista Esperantista Tutmonda Asocio SETA, kies celo estas "per internacia helplingvo Esperanto helpi al la popoloj ekstermi la enradikigintajn restaĵojn de la faŝismo, firmigi la pacon kaj konstruigi la socialismon".

**Dachau-klubb.** En av esperantoklubbarna i Wien kunde vid senaste sammankomst hälsa en frihetskämpe från spanska inbördeskriget, vilken tack vare esperanto lyckats hålla kontakt med flera av de 27 nationers medkämpar han där haft. Efter Francos seger drogo sig utlänningarna in i Frankrike och samlades i läger. Han lyckades samla ett antal esperantister kring sig och när dessa överfördes till det fruktade Dachau, fortsatte de där sitt esperanto-umgänge över huvudet på sina väktare.

**SVERIGE INLEDER KONTAKTEN MED UTLANDETS ESPERANTISTER GENOM SOMMAR-UNIVERSITETET I UDDEVALLA. DELTAGARE FRÅN NORDENS ALLA LÄNDER! DELTAG!**

**Esperanto i Österrike.** Med åtryckt stämpel "Österreichische Zensurstelle 59" kom häromdagen ett gladlynt 10-sidigt häfte "Mitteilungsblatt" daterat März 1946 och anmälde sig som "Informilo por membroj, funkciuloj kaj unuigoj de la Aŭstria Esperantista Federacio" med andra ord: organ för Österrikiska Esperanto Förbundet.

Man hälsar alla esperantister och berättar med stolthet att man, efter det knappa första år man haft på sig, omsluter 22 klubbar i Wien och 31 klubbar i övriga Österrike. Vidare har man bildat ett institut för undervisningen (liksom vi här i Sverige) och ett bokförlag, som fått namnet "Tramondo".

Det är som att börja från början, säger man, men tillägger, att den snabba farten mycket beror på att man under kriget, trots alla faror, förstått att hålla ihop "under jorden". En stor svårighet ligger i att det mesta av landets esperantolitteratur gått förlorat, främst det som varit samlat i klubb-bibliotek och blivit nazistbyte. De nybildade klubbarna annonsera sig som politiskt neutrala, men f. d. nazister mottagas ej "ĉar ili perfidis la internan ideon de la esperantismo".

Tidningen lämnar utom sin egen och förlagets adress: Neutorgasse 9, Wien I, även en i Sverige ofta efterfrågad, nämligen: Hovrat Hugo Steiner, adreso Bisamberg bei Wien, varifrån han leder Österrikes "Esperanto Amikaro".

I samband härmed kan nämnas, att en för esperantorörelsen betydelsefull institution lyckats undgå förstörelsen, nämligen Internationella Esperantomuseet i Wien. Detta museum hyser material, som belyser esperantos historia, samt ett betydande bibliotek.

Tidningarna ställer sig mycket förstående till esperantorörelsen. Lärartidningen Demokratische Pädagogik har en stående esperantospalt.

Korajn salutojn de Svedlando al niaj aŭstriaĵ samideanoj.

**Frankrike.** Senaste numret av Franca Esperantisto har kommit, tryckt på det papper, som Svenska Esperanto-Förbundet lyckats anskaffa och överföra till Frankrike. Tidningen tackar för hjälpen genom att avtrycka vår ordförandes missivbrev med papperssändningen. Numret prydes dessutom av ett porträtt av hr Malmgren, visande bl. a. papperets goda kvalitet.

Professor C. Aymonier börjar i detta nummer sina esperantomemoarer, som lova att bli särdeles intressanta.

Raymond Schwartz skämtar i sin sedvanliga spalt på sedvanligt vårdslöst maniere, men så mycket allvarigare är tidningens bilaga Esperanto et commerce, som vänder sig med annonser och text till handelsvärlden.

## Utländska

## Esperanto

## Tidningar

HEROLDO DE ESPERANTO	Kr. 9: —
AMERICAN ESPERANTIST	Kr. 6: 50
LA VERDA FLAMO (Maroko)	Kr. 4: 50
DANSK ESPERANTOBLAD	Kr. 3: 50

Prenumerationspriset gäller för 1946 och kan inbetalas till

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**  
Postgiro 578 Stockholm 19.



**Argentino.** En dag i början av april kom ett sept-dec-nummer av Argentina Esperantisto, som är organ för argentinska esperantoförbundet. Vi ha saknat den under kriget och hälsa det 16-sidiga prydliga häftet välkommet och gratulera redaktionen, som lyckats göra innehållet så överskådligt och vårdat i uppställningen — något som man ju också gärna väntar av en kvartalspublikation.

Av nyheter från Argentina är att anteckna, att esperantoförbundets 4:e årskongress hållits i Cordoba 18—20 april, och att förbundet öppnat en särskild sektion "Serĉado de parencoj", om vilken kan läsas närmare på annat ställe i dagens nummer av Espero.

Huvudartikeln i den argentinska tidningen är av G. B. Lopez, och den avhandlar vikten av fackordlistor på esperanto och uttalar samma tillfredsställelse över IEL:s arbete på detta betydelsefulla område, som vi i vårt senaste december-nummer av Espero gav uttryck åt.

Tidningen anmäler vidare det första originalverket på esperanto, som veterligen utgivits i Argentina. Det är ett 20-sidigt häfte: "La trovita feliĉo" av Tibor Selkelj, avsedd som "läsebok vid kurs-avslutningar".

Särskilt intressant är redogörelsen för en radiofejd mellan Nord- och Sydamerika, där Nordamerika angrep esperanto, och Sydamerika skötte försvaret så elegant, att t. o. m. själva angriparen först i brev och sedan i radio medgav, att motståndarens argument för esperanto inte kunde gendrivas.

AEKA är en självständig esp-organisation bland Argentinas esperantister. Dess adress är Dr Gonzales, B Mitre 1524, Buenos Aires.

**Samideanoj!** Ĉu iu el vi posedas kelkajn malnovajn sportaĵojn (temas pri pilkoj, sportvestoj, sportstrumpoj kaj sportbotoj), kiujn vi volas doni aŭ je malalta prezo vendi al niaj ĉeĥaj samideanoj? Se jes, bonvolu turni vin al Ebbe Vilborg, Älvsborgsgatan 50, Göteborg.

Nederlanda fraŭlino kun dektrijara sperto en hejmmastrumado kaj diplomita vestkudristino deziranta lerni ŝpinadon kaj teksadon en ia sveda familio, estas preta fari tiean mastrumadon por malgranda rekompenco. Ĉiujn skribaĵojn bonvolu adresi al F-no A. Bosscher, Volkerakstrato 49-II, Amsterdamo Z. Nederlando.

## Internaciaj Feriaj Esp-Kursoj en Danlando

Hadsten: 13.—20. julio kaj 20. —27. julio.

Helsingør: 28/7—4/8.

Kostoj: 56:— kr., 63:— kr., aŭ 75:— kr. laŭ loko kaj ĉambro.

Bonega kaj abunda manĝaĵo.

Petu prospekton ĉe

L. FRIIS,  
Ingemannsvej 9,  
AABYHØJ, Danl.

Por korespondi kun ĉiuj landoj, interŝanĝi objektojn, aligŭ al la trilingva klubo "AMIKECO". Petu informojn de s-ro H. Sørensen, Herkulesgatan 59 D1, Göteborg.

## Korespondado.

S-ro Laŭlum, c/o Cengtuu Esperanto-Ligo PO Box 77 Changtu, Kina (22-jara junulo), deziras korespondi.

Koresponda Centro, Tegelbacken, Stockholm C, peras leterojn de korespondemuloj en ĉiu mondparto.

Deziras svedajn korespondantojn: S-ro Ivo Borovečki, Komenjak 4 (kod Maric) Zagreb, Jugoslavien. S-ro Sterjo Z. Kukušev, str. "Mihail" 114, Peŝtera, Bulgarien. 20-jaraj francaj gelernantoj. Resp. al s-ro Gustave Darras, Rue Jules Ferry 28, Lievin, Pas de Calais, France.

## LIDJA ZAMENHOF VIVAS?

La ĉeĥoslovaka radio komunikis en unu el siaj esperanto-elsendoj, ke ĝi el amerika fonto estis informita, ke f-ino Lidja Zamenhof vivas ie en Sovjet-unio. — Ĥiaj amikoj en Svedlando arde deziras de ŝi vivosignojn.



Vol. III

## Mi serĉis oron kaj oleon sed trovis ...

de David Flood

Aventuraj travivaĵoj en Usono de sveda elmigranto.

Tradukita el la sveda de Karl Gustafsson.

Prezo kr. 6:75 bind., kr. 6:— broŝ.

Por membro de la Literatura Klubo Stelo-Libro

Kr. 5:25 bind., kr. 4:50 broŝ.

(Aldonu 15 % por imp. kaj afranko)

**ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

Fack 190 71, Stockholm. Poŝtkonto 578.

## Värdefulla men verkligt billiga böcker

nys hitkomna från Frankrike

KLARI — romano ..... Kr. 0:60

POLUSAJ GLACIOJ SUB NOKTOMEZA SUNO — Vojaĝpriskribo riĉe ilustr. .... „ 0:70

LA BELA HISTORIO DE JOZEF — biblia rakonto ..... „ 0:70

GEORGO DANDIN — komedio de Molière ..... „ 0:70

RAPORTOJ KAJ KONKLUDOJ — de la konferenco "Esperanto en moderna vivo, Paris 1937" ..... „ 1:10

MAKSIMOJ — de La Rochefoucauld ..... „ 1:80

15 % för oms. och porto tillkommer

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 190 71, Stockholm 19. Postgiro 578



## Förhistorisk grottmålning.

Även de förhistoriska människorna hade sitt språk och sina hobbies. De hade speciella skrivtecken och tillverkade grottmålningar, så att de både kunde förstå varandra och följa med händelseutvecklingen.

Vår moderna tid rör sig med andra språk och andra tidsfördriv för att bibehålla kontakten människorna emellan. Såsom ett önskvärt mål framstår därvid folkens enande genom ett gemensamt intresse.

Ej minst arbetar det redan år 1901 grundade **Internationella Samlareförbundet Skandia** för detta mål. Förbundet, som har sitt säte i Stockholm, riksföreningar bl. a. i Danmark och Norge samt generalsekretariat litet varstades, är med sina 700 medlemmar i ett 30-tal länder ett lämpligt forum för anslutning också från alla slags samlare med esperanto på studieprogrammet.

Skriv efter prospekt till

**SKANDIA - SERVICE**

S:t Eriksgatan 32 A, II, Stockholm

## Svenska Esperanto-Tidningen

**La Espero**

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Eva Julin, Nytorngsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Tel. 42 53 84.

*Prenumerationspris:* helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:40. Utkommer en gång i månaden.

*Annonpris:* 20 öre pr mm. *Korrespondensannons:* 1:50.

*Expedition:* Förlagsföreningen Esperanto, Box 190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.**, postadress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL** (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50; Membro-Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Patrono 90:—.

Härmed kallas andelsägarna i

## Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

till ordinarie årsmöte

pingstdagen den 9 juni 1946 kl. 9 f. m.

i BOHUSGARDEN, Uddevalla.

Ärenden enligt stadgarnas § 11.

Styrelsen.

GLOBUS, Universal Correspondance and Hobby Exchange Post Card Club, estas la plej bona kaj malkara klubo en Eŭropo. Por korespondi kun ĉiuj landoj aligü al kvarlingva klubo GLOBUS. Sendu 7 int. resp. kuponojn por 1-jara membreco al ACADEMIA COSMOS, Apartado 140, MALAGA, Hispanio, kaj vi ricevos membrokarton, kdekson ktp.

**Redigeringen av nummer 6 avslutas den 24 maj.** (Sex spalter text stå över.)

# YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

**Bygg för framtiden ett högisolering stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.**

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**